

Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo mardon la 19-an de aprilo 2022 per Zoom

Ĉeestis

Bård Hekland, Jardar Eggesbø Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget (parte) kaj Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo

Ni aprobis la tagordon.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 8-an de marto 2022

La protokolo de la pasinta kunveno jam aprobiĝis rete. Neniu komento.

3. Landa kongreso 2022

Marianne demandos al Amelie, ĉu ŝi havas proponon pri distra programero fine de la dua vespere (kaj ĉu ŝi eĉ pretas gvidi ĝin). Marianne faros mallongan enkondukon al la diskuto pri estonta laboro de la asocio (la duan vesperon). Bård dissendos al la estraranoj komentotan programproponon.

4. Reta instruado

Marianne informis pri la du kvarvesperaj retaj kursoj, pri kiuj ŝi anticipas dissendis raporton. Ni planas septembre denove oferti kursojn, eble ripete la du unuajn nivelojn kaj ankaŭ konversacian kurson por tiuj, kiuj finis la du unuajn. Indas proponi al ekskursanoj partoprenon en internaciaj fizikaj kaj retaj aranĝoj, retlistoj kaj similaj kunvenejoj, kie ili povas uzi la lingvon. Gravus la kvalito de tio, kion ni proponas. Ni instigu ilin, se bezonate, peti monapogon de la legaco Uhlen por eventuala vojaĝo al SES aŭ simila kursejo/renkontiĝo.

5. Skandinava kongreso 2022

Aliĝis al la tuta kongreso nur tri-kvar norvegoj. Ni provu instigi al Oslo-anoj (ankaŭ al ekskursanoj) partopreni almenaŭ tiujn tagajn programerojn, kiuj okazos en Oslo.

6. Vigligado de NJE

Prokrastita.

7. Ĉu aktualas peti projektan monon de Legaco Uhlen?

Bård informis pri la fakto, ke la sumo de la legaco prefere estu pli malalta ol la nuna, kiu iom superas unu milionon. La momento taŭgas por realigi seriozajn projektojn, postulantajn iom da mono.

8. Eventualaĵoj

***Elekto de komitatano A de UEA** – Ni decidis peti Kjell Peder Hoff daŭre esti la komitatano A de NEL.

9. Venonta estrara interkonsiliĝo

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos ĵaŭdon la 9-an de junio je 20.00.

Protokolis Marianne Lund